

Ni aŭskultu Denis de Rougemont, 7-a parto
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 766, 1978.06.15 & 17

Cl.- Parolas Claude Gacond.

Mi konkludos hodiaŭ mian prezentadon de la libro « L'Avenir est notre affaire » (Estonteco estas nia afero) de la svisa verkisto Denis de Rougemont.

Denis de Rougemont, fine de sia verko, atentigas nin pri politika fakto, kiun li nomas "la leĝo de Jean-Jacques Rousseau". (p. 261). "Al tre malgranda Ŝtato korespondas maksimumo de civitanaj liberecoj, sed ju pli la Ŝtato vastiĝas, des pli la libereco malgrandiĝas." (p. 261). Tiu ĉi leĝo de Jean-Jacques Rousseau povas ankoraŭ resumiĝi tiel: "Ju pli komunumo estas eta, des pli ties registaro povas esti demokrata; ju pli Ŝtato estas multthoma kaj vasta, des pli ties povo devas koncentriĝi." (p. 261)

Denis de Rougemont, kiel fakte Jean-Jacques Rousseau faris siatempe, pledas favore al malgrandaj hom-unuoj, al malgrandaj civitoj, kiuj favoras demokratian disvolviĝon. Dum tiu ĉi radioprelego ni tre resume prezentos la penson de Denis de Rougemont koncerne modernan temon, kiun Jean-Jacques Rousseau siatempe ne povis vidi, tio estas la iompostioma konstruo de Eŭropo. Por Denis de Rougemont ni nuntempe staras antaŭ grava tasko: "Rekrei komunumon, kie la homo povu reakiri civitanan dimension sen kiu, li ne estas vera persono." (p. 235). Tiu ĉi rekreo, por Denis de Rougemont estas "la ĉefproblemo de nia tempo." (p. 235)

Ni citu : « Transe de la Naciŝtato kaj de la aro da valoroj, kiun ĝi implicas (senfina materia kresko, misuzo de energio, ĉiam pli de ĉio je kiu ajn prezo, ktp...)... ni devas remalkovri la komunumon, kiu apartenas al ĉiuj, ties spirito, valorojn kaj praktikajn aktivecojn." (p. 255) Denis de Rougemont klare demonstras, ke la Naciŝtatoj estas hodiaŭ "eksvalidaj modeloj". Jen tiurilate signifa citaĵo: "Montri ke la Naci-Ŝtato estas ja eksvalida politika modelo, ĉiam pli malutila en sia postvivo, jen eble la nuntempa maksimumo, kiun ni povas fari. Tio ĉi tamen vipas la imagpovon kaj malkovrigas sekvojn..." (p. 259)

Ĝuste tion ĉi faras Denis de Rougemont konklude al sia libro "Estonteco estas nia Afero". Li provas vipi nian imagpovon koncerne la malkovron aŭ la remalkovron de tio, kio estas "bona Ŝtato." (p. 230). Ni citu: "Ekzistas bona Ŝtato, konceptebla kaj ebla, kaj eĉ reala: historio konis el ĝi plurajn ekzemplojn, en la landoj kie la federacia reĝimo estas ne nur menciita en la Konstitucio, sed praktikata." (p. 230).

Por Denis de Rougemont la "bona Ŝtato supozigas du ĉefkondiĉojn: ĝi devas esti samtempe limigita kaj dispartigita" (p. 231). Pri la "limigo" li skribas: "La bona Ŝtato prizorgas la mastrumadon de la komunumo. Ĝi librotendas, ĝi observas la pagdatojn, certigas la publik-servojn kaj administras la rezervfondusojn. Rezigninte memgarantii la proprajn celecojn, ĝi devas resti submetita al ĉiama kontrolo pri la fideleco de sia servo." (p. 231). Por Denis de Rougemont ĉiuj Naciŝtatoj, kiuj memgarantias la propran defendon, uzurpis povon, kiu devus aparteni al superŝtata kontrol-instanco.

Krom la limigo de la povo de bona Ŝtato, kiel ni vidis, Denis de Rougemont alvokas "dispartigon" de tiu ĉi povo. Ni resume citu lin: Ni "malagnosku la principojn de fiksitaj komunumoj" (p. 255). Ni agnosku la principon de "la plureco". (p. 255) "Nia tempo estas tiu de la kompleksaj aroj (aŭ ensembloj) organizitaj per retaro de ŝanĝeblaj sistemaj ligoj kaj kiuj ĉesis dependi de limigita teritorio, kiel la naciŝtato. (p. 256). Ni celu al "regionoj samtempe

malfermitaj kaj fermitaj, kiujn oni facile rimarkas; kaj (al) federigoj, kiujn oni formas por asekuri ĉies aŭtonomecon kaj la rajton al malsimileco." (256)

Por Denis de Rougemont ni hodiaŭ devas do inventi aŭ reinventi komunumajn modelojn, kiuj havos precize limigitajn celojn kaj konekzistos en plureco. Li estas severa kontraŭ la Naciŝtata modelo, kiu ĝuste ne agnoskas limigon de la propra povo kaj la plurecon de la povoj. "Nova socio povos kreiĝi nur koste de simbola ofero: tiu de la Naciŝtato..." (p. 254). "Ĉar estas la Naciŝtato, kiu konservadas perfortemon kontraŭ ĉiuj" pro la emo al memdefendo. Por Denis de Rougemont la "perfortemo kontraŭ ĉiuj", kiu karakterizas la naciŝtatan modelon estas "unuformiga stulteco", "kaŭzo kaj rimedo de centralizemo" kondukanta al "policaĵ regimoj". (p. 254). Ni devas "konstrui novan socion paralela" (p. 264) al la naciŝtata, kiu estas eksa modelo pereonta. Ni citu: "Kiam estas necese arbitri, kunarangi, elekti, decidi ĉu tia aŭ tia rimedo konvenas por la komunaj celoj, ne rajtas plu juĝi la Ŝtato, sed la politika povo, tio estas - laŭ la dimensioj de la taskoj kaj la respondaj komunumaj niveloj: la Asembleo de la malgranda loka komunumo, la Konsilantaro elektita de la Regiono, la Parlamento de la Federacio (de la suverenaj Regionoj) aŭ ties plenuma instanco, kiam ĝi eksplicite ricevis tiun ĉi funkcion, tiun ĉi rajton." (p. 231-232).

Por Denis de Rougemont "La solvo, kiu sin trudas (por la konstruo de Eŭropo) estas tiu de ia interkomunuma sindikato. Tiu ĉi sistemo, kiu senbrue disvastiĝas en tuta Eŭropo, lokiĝas kaj formuliĝas en la Regionoj: ĝi permesas difini tiujn ĉi kiel grapolojn aŭ arojn da komunumoj, kaj, kun iom pli da precizo, kiel arojn de pluraj komunumaj sindikatoj, ĉiuj respondantaj al la necesoj de specifa kampo: lernejoj - transportrimedoj - landprizorgado, ktp. Ĉiu sindikato grupigas la komunumojn, kiuj deziras kaj kiuj tion bezonas, sen devigo por la aliaj." (p. 277).

Denis de Rougemont antaŭvidas, ke "la Regiono" fariĝos "la ŝlosilvorto de nia estonteco, se ni ĝin volas demokrata." (p. 278). La Regiono estos "loko de kunlaboro dank' al kiu la komunumoj trovos rimedojn, kiuj mankas al ili, por fakte pritrakti niajn aferojn. "

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo!